

AKIRI – Strategia Plano de Universala Esperanto-Asocio

2025 – 2030

Fernando Maia Jr.



Universala Esperanto-Asocio

Kio estas AKIRI

AKIRI estas la Strategia Plano de Universala Esperanto-Asocio (UEA) por la periodo 2025–2030. Ĝi estas ilo por antaŭenigi dum sia daŭro la Mision, Vizion kaj Valorojn de UEA. Surbaze de unueco, efikeco kaj aliro al la tuta mondo, pli ol plano ĝi estas **komuna, unuiga vojo** por la tutmonda Esperanto-komunumo. Ĝi celas antaŭenigi al pli ampleksa skalo la idealojn de lingva justeco, interkompreniĝo kaj mondcivitaneco, kiuj jam estas realo en la Esperanto-movado.

Por ke AKIRI sukcesu **ĉiu el ni gravas**. AKIRI aplikiĝas ne nur al specifaj instancoj de UEA, kiel la Estraro, la Komitato aŭ la Centra Oficejo, sed kalkulas je la aktiva partopreno de ĉiuj esperantistoj de bona volo, kiuj kredas je la **forto de kunlaboro** kaj la **potenco de Esperanto** por konstrui pli justan mondon.

Ni invitas ĉiujn vin ne nur subteni, sed **kunformi** la realigon de tiu plano – per viaj ideoj, iniciatoj kaj engaĝiĝo. Ni laboru kune por **akiri la estontecon, kiun ni deziras**, kun espero pri la homaro – io, kion la Esperanto-movado ĉiam havis kaj ne ĉesos havi. Ĉar ni konscias pri la potenco de nia espero – kaj tiel same pri la potenco de nia aktivismo.



Kunteksto

La planon **AKIRI** eblis konstrui grandparte surbaze de la **elstara** laboro farita de Duncan Charters, eks-prezidanto de UEA (2019–2025). Charters entreprenis dum siaj mandatoj la renovigon de la **ampleksa kaj same elstara** strategia plano de UEA (2013–2017) redaktita de la antaŭa prezidanto Mark Fettes (2013-2019), kiu tiam baziĝis sur kvar kolonoj, "la kvar K": *Konsciigo, Komunumo, Kapabligo kaj Kunordigo*.

Post pluretape zorgoplena revizia laboro Charters funkciigis novan planon sub la nomo KIRI, ĉi-foje reprezentanta novajn strategiajn kampojn: *Kunlaborado, Informado, Rilatoj* (kun la ekstera mondo) kaj *Instruado*. En sia Ĝenerala Kunveno de 2025 la Komitato de UEA elektis novan Estraron (2025-2028) kaj taskis ĝin doni finan formaton al tiu plano.

Kiel nova prezidanto mi fariĝis respondeca pri la estrara fako **Strategio**. Mirejo Grosjean, komitatano A por Svislando, atentigis, ke la akronimo KIRI, kvankam ĉarma, signifas i.a. "tranĉi" aŭ "fini" en la japana, kaj spontane proponis, ke nova plano funkcii sub pli pozitiva nomo, **AKIRI**. Tio bone sonis en la Komitato kaj efektive mankis reliefigo de unu grava kampo en la KIRI-strategio, nome *Administrado*, kiu pro sia graveco, kvankam ne eksplicita en la menciita akronimo, neniam ĉesis aperi en la jarraportoj de UEA. Tial mi elektis *Administrado* por reprezenti la A de AKIRI kaj tenis ĉiujn aliajn strategiajn kampojn difinitajn de Charters.



Talentoj de UEA

En la finfasonado de la strategiaj laboroj laŭ la nomo **AKIRI** mi havis kiel ĉefajn atentojn: (1) elekti periodon (5-jaran) por la formala valideco de la plano; (2) difini mision, vizion kaj valorojn de UEA por la periodo; (3) doni al ĉiu strategia kampo klaran superan celon kaj konkretajn iniciatojn; (4) identigi al kiu kampo ĉefligiĝas ĉiuj estraraj fakoj, institucioj kaj konstantaj agadoj de UEA; (5) kaj uzi mezureblajn indikilojn por taksi la ĝeneralan progreson de la agadoj en la plano, identigi per kies rimedoj ili povas realiĝi, kiuj riskoj povas ilin malhelpi kaj kiujn alternativojn oni povas elekti okaze de nekompleta sukceso. Tiuj lastaj aspektoj devas aperi pli detale ne en tiu ĉi dokumento, sed kiel aspektoj en dokumentoj de interna uzo por kunordigantoj de agadoj. Tamen ĉi-dokumente aperos apendice ekzemplo de tio, kiel la afero devas funkcii. Fine, sed ne malpli grave, forte gvidis min tio, kio por mi estas la **talentoj de UEA**:

Kunligi UEA kunligas la individuajn esperantistojn kaj la diversajn asociojn, organizaĵojn kaj iniciatojn de kaj por Esperanto en unueca tutmonda reto	Reprezenti UEA estas la reprezentanto de tiu reto kaj la respektata voĉo de Esperanto antaŭ internaciaj instancoj kiel UN, Unesko kaj pluraj aliaj	Servi UEA estas la ĉefa provizanto de servoj por la Esperanto-komunumo
--	--	--



Misio, Vizio kaj Valoroj de UEA

Nia misio reprezentas tion, por kio ni ekzistas – niajn celojn, **por kio ni laboras** kaj kion ni faras. Nia vizio aldone reprezentas tion, al kio ni deziras alveni, **al kio ni laboras** kaj kien ni strebas atingi – **kion ni akiru**. Ambaŭ – misio kaj vizio – estas subtenataj de niaj valoroj, kiuj nutras la kulturon, kiun ni bezonas, por la realigo de nia strategio.

Misio de UEA

Antaŭenigi lingvan justecon, kulturan diversecon, internacian kunlaboron, pacan kunvidadon kaj solidarecon per disvastigo kaj utiligado de Esperanto kiel neŭtrala internacia lingvo kaj per subteno al multlingvismo kaj poliglotismo. Ni laboras por plu fortigi la konscion pri Esperanto kiel ilo por justa komunikado kaj antaŭenigo de diverseco, inkluzivado kaj kulturo de paco. Ni reprezentas la tutmondan Esperanto-movadon.

Vizio de UEA

Strebi al mondo, kie ĉiuj homoj povas dialogi sen lingvaj baroj, respektante la lingvajn rajtojn de ĉiuj popoloj kaj kunlaborante por komunaj pozitivaj ŝanĝoj en la socio. Ni kredas je mondo, kie ĉiuj lingvoj kaj kulturoj estas respektataj, kie Esperanto havas rekonitan rolon en la solvo de la mondaj lingvaj problemoj kaj kie homoj interkompreniĝas kaj konscias pri si kiel parto de unusola tutmonda komunumo.



Valoroj de UEA

Lingva Justeco

Ni kredas je la rajto de ĉiu homo uzi sian propran lingvon en ĉiuj aspektoj de la vivo, inkluzive de edukado, laboro kaj komunikado, kaj Esperanton kiel neŭtralan lingvon por pli da egaleco en internaciaj rilatoj

Respekto pri diverseco

Ni apogas la diversecon de kulturoj kaj lingvoj kaj laboras por protekti kaj antaŭenigi la lingvaj kaj kulturajn rajtojn de ĉiuj popoloj, kreskigante pri tio konscion kaj respekton

Kulturo de interkompreniĝo

Ni batalas kontraŭ lingva diskriminacio kaj por mondo, kie homoj de ĉiuj devenoj povas kompreni unu la alian sen lingvaj baroj kaj en dialoga kulturo, en kiu paco kaj kunlaboro estu antaŭenigataj per komuna neŭtrala lingvo

Solidareco

Ni antaŭenigas la principon de reciproka helpo kaj kunlaboro inter ĉiuj homoj, sendepende de iliaj lingvo, kulturo aŭ nacio, atentaj pri la nejustaj malegalecoj en la mondo kaj pri la ŝancoj por bonaj interŝanĝoj, kiam homoj estas malfermitaj lerni unu de la alia, sendepende de la devenoj

Mondcivitaneco

Ni subtenas tion, ke ĉiu homo povu senti sin ne nur apartena al la tutmonda komunumo, sed partoprenanta en ĝi kaj por ĝi aktive kontribuanta, uzante Esperanton kiel ilon de pluraspekta homa emancipiĝo kaj subtenante vastan interesiĝon pri aliaj lingvoj kaj kulturoj



Noto pri la misio, vizio kaj valoroj

Por konstrui – kaj funkciigi – strategian planon organizaĵo devas atente konsideri la rilatojn inter kulturo, valoroj kaj strategio. Peter Drucker (1909-2005), aŭstra-usona profesoro, konsiderata la "patro" de la moderna administra teorio, havas pri tio faman frazon: **"la kulturo voras la strategion matenmanĝe"**. Tio instruas, ke, kiam la kulturo ne esprimas kondutojn aŭ valorojn agordajn al la celata strategio, la strategio alfrontos minacojn por sia efektiviĝo – kaj eventuale ne realiĝos ekde la komenco mem.

En tiu senco kulturo estas kiel la "dentradoj" de la strategio. Tiu konscio gravas, ĉar strategion oni ofte pensas teorie sen konsideri, ke la kulturo jam okupas la spacon, kie la strategio deziras ekzisti praktike. Por efektivigi strategion necesas kompreni, kian kulturon la organizaĵo havas – kaj se la kulturo ne estas agorda al la strategio, necesas agi por ĝin ŝanĝi.

Ja kulturo ne estas io, kio ekzistas spontane, sed kio spegulas antaŭajn intencojn, eĉ se jam forajn en la tempo. Kulturo spegulas valorojn: se necesas ŝanĝi la kulturon, necesas deklari novajn valorojn; se ne necesas ŝanĝi la kulturon, indas ĉiel ajn refortigi la valorojn, kiuj subtenas la kulturon, por ke ili helpu ĉefdirekti la kulturon al la celata strategio.

La kulturo estas en tio, kion la komunumo faras ĉiutage, en niaj labormetodoj, en niaj agadoj, en nia aktivismo, en niaj sintenoj. Ĉar ankaŭ kulturo estas do objekto, kiun oni povas konstrui, nur konscia komunumo povas havi konscian kulturon por plene efektivigi la celatan strategion. Difinante sian Mision, Vizion kaj Valorojn kadre de AKIRI, UEA reliefigas la elementojn, kiuj jam troviĝas en ĝia Statuto kaj en nia ĝenerala agado, tiel ke ili fariĝu ankaŭ ĉefgvidiloj en la realigo de la plano ĝis 2030. Tio estas invito, ke la komunumo celeme kaj konsciplene **kulturu sin**.

La daŭro: 2025-2030

AKIRI havas formalan daŭron de 5 jaroj (2025–2030). Tiu daŭro reprezentas sufiĉe longtempan perspektivon, signalas stabilecon kaj la ambicion de la vizio – kaj referencas al la konkludaj jaroj de la Tagordo 2030 de Unuiĝintaj Nacioj. Ĝi donas sekuran tempon por konkretigi celojn.

Samtempe – por ne riski malaktualiĝon, se okazos grandaj ŝanĝoj en la mondo aŭ en la movado (ekz-e teknologiaj, financaj aŭ pri internaciaj rilatoj) – la realigo de AKIRI estas fleksebla kaj antaŭvidas periodan revizion de laborplanoj, konsiderante tiujn eksterajn faktorojn kaj la internan evoluon mem de la plano.

Se okazos, ke post 5 jaroj ne tuj aperas nova strategia plano, la esenco de AKIRI plu validos por la agado de UEA.



La strategiaj kampoj en AKIRI

Ĉiu strategia kampo havas superan celon. Al ili ligiĝas la estraraj fakoj kaj aliaj agadkampoj de UEA, kun identigo de celoj kaj konkretaj rezultoj laŭ diversaj niveloj, realigrimedoj, riskoj, indikiloj, sanigiloj kaj perioda revizio de la progresoj.



A – Administrado

Celo: Garantii efikan, travideblan kaj respondecan administradon de ĉiuj aspektoj de UEA.

Sekcioj: Strategio, Kunordigo, Statuto kaj regularoj, Komitato, Estraro, Oficejoj, Libroservo, Delegita Reto, Komisionoj kaj komisiitoj, Membraro, Revuoj, Financoj, Sistemoj kaj retejoj.



K – Kunlaborado

Celo: Teni, plifortigi kaj faciligi la reciprokan subtenon kaj partoprenon de homoj en agadoj agordaj al la celoj de UEA.

Sekcioj: Rilatoj kun TEJO, Kongresoj, Regiona kaj Landa agadoj, Faka Agado, Scienca Agado, Kultura Agado, Eldona Agado, Virina Agado, Reta Agado, Esperanto-centroj, ZEO-j, Ĝemelaj Urboj.



I – Informado

Celo: Profesie, ĝuste kaj vaste informi pri Esperanto kaj UEA.

Sekcioj: Komunikado, Gazetaro, Reklamado, Poliglota Agado, Esperanto-kursoj (bazaj), Amikoj de Esperanto, Sociaj Retoj.



R – Rilatoj

Celo: Fortigi la ĉeeston, influon kaj reputacion de UEA en internaciaj platformoj, organizaĵoj kaj politikoj favore al Esperanto kaj la valoroj de UEA.

Sekcioj: Eksteraj Rilatoj (subsekcioj UN, Unesko, EU, BRICS).



I – Instruado

Celo: Subteni edukadon kaj lernadon de kaj per Esperanto tutmonde.

Sekcioj: Aktivula Maturigo, Rilatoj kun ILEI, Ekzamenoj, Rilatoj kun [Edukado.net](https://www.edukado.net), Rilatoj kun Akademio de Esperanto, Bibliotekoj, Esploro kaj Dokumentado, Rilatoj kun CED, Terminologio, Universitata Agado.



Noto: la sekcioj kaj subsekcioj ne elĉerpas la agadojn, kiuj povas enkadriĝi en AKIRI, sed ĉefe indikas al kiuj strategiaj kampoj ĉefligiĝas estraraj fakoj kaj agadkampoj.

Strategiaj celoj kaj altnivelaj rezultoj de AKIRI

La strategiaj kampoj estas treege ampleksaj, kio montras la profundan valoron de UEA por la tutmonda Esperanto-movado. La bona funkciado de ĉiuj fakoj kaj agadoj estas nepraj. Tamen, por ilin resume reprezenti, UEA difinas kadre de sia strategia plano la absolutajn prioritatojn de la Asocio, la "strategiajn celojn" – la plej altnivelajn rezultojn, kiujn UEA strebas atingi en ĉiu kampo de AKIRI. Al ĉiu kampo ligiĝas 3 strategiaj celoj.

Ili estis difinitaj surbaze de la esenco de AKIRI kaj ĉefe de la **rekomendoj de la Komitato de UEA** al la Estraro okaze de la Ĝenerala Kunveno kaj komitataj forumoj de la 110-a Universala Kongreso de Esperanto. Tiuj rekomendoj aperas detale en la [protokolo](#) de la kunveno.

Strategiaj celoj por Administrado

- 1. Moderniĝo:** amplekse modernigi la administran kaj finanĉan infrastrukturon per aŭtomatigo de procezoj, optimumigo de la uzanto-sperto kaj faciligo de informanalizo (membro-administrado, retkomerco, raportado) – por esti pli efika, servema kaj travidebla.
- 2. Finanĉa daŭripovo:** garantii la necesajn enspeznivelejn per diversigo de la finanĉaj fontoj (kotizoj, donacoj, investoj, projektoj) – por sekurigi longdaŭran finanĉan stabilecon de UEA.
- 3. Kunordiga efikeco:** sukcese efektivigi la transiron al nova, pli efika oficeja modelo per konkludo de la vendo de la nuna oficeja domo, noviga funkciigo de la Libroservo kaj pli internacia kaj teknologiapogita kunlaborantaro – por pli bone kaj tutmondece mastrumi la materiajn kaj homajn rimedojn.



Strategiaj celoj por Kunlaborado kaj Informado

Strategiaj celoj por Kunlaborado

4. Komunuma reto: fortigi la reton de landaj kaj fakaj asocioj, organizaĵoj kaj individuoj per struktura subteno, renkontplatformoj kaj komunaj projektoj – por esti pli efikaj, konsciaj kaj solidaraj.

5. Kultura kaj scienca fortigo: aktive subteni la kreadon, disvastigon kaj konsumon de altkvalita iesperantlingvaj kulturo kaj scio (literaturo, muziko, teatro, kino kaj aliaj kampoj de arto kaj homaj kreemeco kaj sciemo) – por materie kaj nematerie riĉigi la komunumon kaj plu konfirmi la kapablon de Esperanto senlime reprezenti la homan spiriton.

6. Juneca vicleco: firmigi kaj profundigi la kunlaboron kun TEJO kaj la spiriton de juneco ĉe la veteranoj per ligiĝo al junulara agado kaj malfermeco al ĉiuj generacioj – por plu kresko kaj vivo de UEA.

Strategiaj celoj por Informado

7. Konsciigo: garantii vastan konscion pri la realo de la stato, uzo, utilo kaj potenco de Esperanto per konstanta kaj ĉelema fluo de faktaj informoj al eksteruloj (amaskomunikiloj, edukistoj, politikistoj) – por subteni la disvastigon de la lingvo kaj ĝiajn kulturon kaj valorojn.

8. Komunikado: revolucii la komunikadon kun la diversaj publikoj per modernaj kanaloj kun regula fluo de altkvalita enhavo kaj interagaj rimedoj – por ne nur transdoni informojn, sed por rikolti impresojn kaj krei daŭripovajn ligojn.

9. Korektado: estigi kompetentan rapideagan teamon per trejnado kaj organizado de instrukcioj pri kiel pritrakti misinformojn – por efike kultivi la publikan bildon de Esperanto.



Strategiaj celoj por Rilatoj kaj Instruado

Strategiaj celoj por Rilatoj

10. Politika akcepto: akiri oficialajn rekonojn de Esperanto (ekz-e kiel kultura heredaĵo aŭ per deklaro de dato kiel la Esperanto-Tago) de almenaŭ unu plia lando aŭ grava internacia platformo (UN/Unesko, sed ankaŭ EU, Brikso, OAS k.s.) – por kreskigi la prestiĝon kaj malfermi pli da spacoj por kunlaboro.

11. Faka aŭtoritateco: pozicii la Asocion kiel specialigitan kaj kompetentan organizaĵon pri lingva justeco kaj interkultura komunikado per oferto de konferencoj, seminarioj kaj konsultservoj – por strebi al mondo, kiu frontas siajn lingvajn problemojn.

12. Ĉies-gajnaj partnerecoj: krei aliancojn kaj formaligi strategian partnercon kun almenaŭ unu granda neesperantista internacia NRO por kunlabori pri komunaj valoroj (lingva justeco, diverseco, edukado, paco, solidareco).

Strategiaj celoj por Instruado

13. Kapabligo: klerigi la Esperanto-komunumon per oferto de kursoj pri kaj per Esperanto kaj per apliko de profesiaj ekzamenoj – por kreskigo de la scinivelo kaj kompetento de esperantistoj, inkluzive pri mondcivitaneco.

14. Edukada esploro: sukcese lanĉi internaciajn pedagogiajn eksperimentojn kaj taksi iliajn rezultojn per subteno al universitatnivela esplorgrupoj – por fakte konfirmi la valoron de Esperanto en Edukado.

15. Universitata enradikiĝo: fortigi la akademiecan prestiĝon de Esperanto per subteno al universitataj katedroj, bibliotekoj kaj arkivoj, esplorprogramoj kaj sciencaj kongresoj – por kreskigi la kvaliton de la scio kaj memoro pri Esperanto.



Resuma superrigardo de la strategiaj celoj



Administrado

modernigi sistemojn; diversigi enspezojn; realigi novan oficejan modelon.



Kunlaborado

fortigi komunumajn retojn; subteni kulturan kaj sciencan produktadon; firmigi kunlaboron kun la junularo.



Informado

konsciigi eksterulojn; modernigi komunikadon; trejni rapidreagajn teamojn.




Rilatoj

atingi oficialajn rekonojn; kreskigi la aŭtoritatecon de UEA; krei partnerecojn kun NRO-oj.



Instruado

oferti kursojn kaj ekzamenojn; subteni pedagogiajn eksperimentojn; enradikigi Esperanton en la universitatoj.



Strategiaj programoj

La strategiaj programoj estas specialaj organiziloj de agadoj kaj metodoj por subteni la strategiajn celojn kaj akiri konkretajn rezultojn. Strategia programo povas havi sian propran daŭron laŭ la specifaj trajtoj de la programo. Ne estas limigita nombro de tiaj programoj. Ekzemploj de tiaj programoj, kiuj funkcios kadre de AKIRI, estas:

Programoj 101 kaj 1001 strategia programo por garantii 101 membrojn de UEA (ĉu individuaj, ĉu aligitaj) el landoj kun landaj asocioj kun potenco kunlabori por tio; kaj strebi atingi 1001 membrojn el landoj kun landaj asocioj kun potenco kunlabori por tio (prioritatoj por 1001 estas Ĉinio, Usono, Japanio, Brazilo, Francio kaj Germanio).	Verdigi E-dezertojn strategia programo por krei Esperanto-komunumon en landoj, kie tio ne ekzistas aŭ bezonas subtenon por plu kreski.	Alianco 365 strategia donacprogramo (reviziita) por optimumigita subteno de la struktura agado UEA kaj faciligo.
Programo Oceanio strategia programo por fortigi kaj videbligi la E-movadon en Oceanio, kun speciala atento al instru- kaj inform-agadoj kaj al indiĝenaj komunumoj kaj lingvoj. Simile por Azio, Afriko, Eŭropo kaj Ameriko.	FoKuSo strategia programo por subteno de faka, kultura kaj scienca agado en Esperanto.	

Programoj tiaj servas kiel pilotaj projektoj kaj pruvoj de koncepto por la pli larĝaj strategiaj celoj de AKIRI, ebligante al ni testi metodojn ankaŭ por kompreni ĉu eblas etendi ilin tutmonden aŭ ĉu necesas adaptiĝi laŭ la diversaj lokaj realecoj.

De "kio" al "kiel": realigo, monitorado kaj taksado

Realigperiodo de AKIRI estas ekde la lanĉo en 2025 ĝis la Ĝenerala Kunveno de la Komitato de UEA en 2030. Realigplanoj estas por la prioritigitaj agadoj kaj konsideras realigrimedojn, riskojn kaj periodan revizion de la progresoj.

Ĉefaj indikiloj devas esti nombro kaj distribuo de la membraro, akurateco de la procezoj, pozitiva plenumo de buĝetoj, nombro de partoprenantoj, garantio de la okazigo, registrado, taksado, financa analizo kaj raportado de la diversaj agadoj kaj progreso rilate al la Strategiaj Celoj en ĉiu kampo de AKIRI.

Ĉiu periodo de AKIRI havos siajn prioritatojn. Sube vi legos la prioritatojn por la periodo 2025-2026. Periodo de reviziado estos ĉirkaŭ la Ĝenerala Kunveno de ĉiu jaro. Ĉar reviziado okazos periode, prioritatoj por ĉiu periodo estos difinitaj post la Ĝenerala Kunveno, ĉefe surbaze de la rekomendoj de la Komitato kadre de la komitataj forumoj.

Do por pli efike mastrumi niajn rimedojn ni identigis la jenajn prioritatojn por la unua periodo, kiuj servos kiel motoroj kaj kies plenumo liberigos rimedojn por pluraj strategiaj celoj samtempe.

Prioritatoj por la periodo 2025-2026

- 1** Funkciigi novan membro-sistemon por plibonigi la uzanto-sperton kaj la efikecon de la internaj procezoj.
- 2** Kreskigi enspezojn tra projektoj, donacoj kaj investoj por kompensi redukton de enspezoj pro kotizoj.
- 3** Konkludi la vendon de la oficeja domo ĉe Nieuwe Binnenweg 176 (Roterdamo) por subteni pli efikan oficejan modelon (inkluzive revizii la funkciigon de la Libroservo por subteni ĝian mision).
- 4** Kreskigi la konscion pri Esperanto por ebligi trafajn informojn kaj akiri pli da subteno al la movado.
- 5** Kreskigi la membraron por fortigi la tutmondan reprezentecon de UEA.

Dum ĉi tiuj prioritatoj estos la ĉefa fokuso por la periodo 2025-2026, ili ne malhelpos la progreson de aliaj Strategiaj Celoj, por kiuj diversaj projektoj kaj rutinaj agadoj devos same funkcii.

Konkludo

Tiu ĉiu dokumento celas doni resuman prezenton de la strategia plano AKIRI al la Komitato de UEA kaj la interesata publiko. Ĝi tamen ne estos la sola prezento de la plano. Prezento de la plano okazos ankaŭ laŭ aliaj dokumentoj: ankaŭ per mallongigita simpligita versio por la ĝenerala publiko (tradukebla en aliajn lingvojn) kaj per apartaj gvidiloj por aktivuloj, kun detala prezento de agadplanoj por interna uzo. Apendice estas ekzemplo de tio.

AKIRI tamen ne estu statika dokumentaro: pli ol tio ĝi estas procezo, fluo. Ĝia vero dependas de nia kapablo kiel komunumo ne nur plani, sed kune agi, lerni, revizii kaj efike kreski kiel movado.

Ni laboru kune por **akiri la estontecon, kiun ni deziras**, kun espero pri la homaro – io, kion la Esperanto-movado ĉiam havis kaj ne ĉesos havi. Ĉar ni konscias pri la potenco de nia espero – kaj tiel same pri la potenco de nia aktivismo.



APENDICO

Programo 101: Kubo – Kadre de la Strategia Plano de UEA (AKIRI)

Celgrupo: Kuba Esperanto-Asocio kaj la Estraro de UEA

Resumo

Tiu dokumento klarigas kaj prikonsideras strategion por funkciigo de la "Programo 101: Kubo", kun la ĉefa celo registri minimume 101 individuajn membrojn de UEA el Kubo kunlabore kun Kuba Esperanto-Asocio (KEA). Tio ebligos al KEA formaligi la nomumon de Komitatano A de UEA el Kubo kaj fortigos la geografian reprezentecon de UEA. La projekto inkluzivas kiel agadojn: datumbazan revizion, kotizstrategion, senpagan aŭ faciligitan membrecon kaj profundan kunlaboron kun la landa asocio.

Celoj de la programo


La Programo 101 okazas kadre de la Strategia Plano de UEA 2025-2030, AKIRI. Ĝi celas garantii almenaŭ 101 membrojn de UEA (individuaj aŭ aligitaj) el landoj kun landaj asocioj, kiuj havas la kapablon kunlabori por tio. Kubo estas unu el la elektitaj landoj por tiu programo, pro sia historia graveco kaj potenco. La programo celas:

- Revivigi la kontakton de UEA kun la membraro en la koncerna lando;
- Aktualigi la datumbazon de UEA kaj ebligi kunlaboron pri tio kun la landa asocio;
- Subteni la movadon en la lando cetere per senpagaj membrecoj (kaj sekva aliro al la servoj de UEA);
- Garantii la nomumon de Komitatano A de UEA por la lando.

Por aliaj landoj kun sufiĉe pli da membroj funkcios la Programo 1001.

Historiaj datumoj pri membreco en Kubo

Ekde 1981 UEA registris 354 enskribojn por Kubo (plejparte homoj). Jen la statistiko de individuaj membroj en la lastaj 26 jaroj:



APENDICO

La averaĝo de individuaj membroj el Kubo por jaro estas super 40, kun pinto en 2010 pro la Universala Kongreso en Havano. La celo de 101 membroj estas realisma. Tamen estas defio: la aktiva membraro malpliigis pro ekonomiaj premoj (alta inflacio, malaltaj salajroj aŭ pensioj, neceso serĉi pli ol unu laborpostenon) kaj malfacilaĵoj pri interreta aliro. Aldone: ne por ĉiuj UEA sentebliis kiel proksima. Strategia avantaĝo estas: sukceso en Kubo servos kiel modelo por aliaj landoj en la Programoj 101/1001.

Datumbaza revizio

El la 354 registroj, nur 104 havas retpoŝtadreson, kaj el tiuj nur ĉirkaŭ duono funkcias. Tial:

- UEA kontaktos rekte la kontakteblajn homojn;
- KEA helpos kontakti la ceterajn, precipe tiujn sen retaliro;
- La datumbazo estos reviziita kaj kompletigita kun aktualaj informoj.

Garantioj de UEA subtene al la programo

- Kubo estis movita de landaro 2 (baza kotizo 7 EUR) al landaro 1 (baza kotizo 2 EUR);
- UEA aranĝas la rimedojn: kadre de la programo membreco estos senpaga por la membroj.

Kunlaboro kun KEA

- Jam okazis unua kunsido de la Prezidanto de UEA kun la reprezentanto de KEA, A. Calienes;
- KEA havas oficejon en Havano kun gastigaj servoj kaj kelkaj filioj havas spacon;
- Okazas kursoj kaj kunvenoj, sed estas defioj, kiujn UEA pretas fronti kune kun KEA;
- KEA proponas spiritan riĉiĝon per Esperanto al kubanoj kiel socian spacon sideje kaj en la filioj por kunvivado kaj interŝanĝo;
- Necesas scii deflanke de UEA, kiun kotiztabelon KEA aplikas por siaj membroj;
- Necesas scii deflanke de UEA pri la nuna strukturo de KEA (sidejoj+filioj).

Defioj

- Inflacio kombine kun malaltaj salajroj aŭ pensioj malfaciligas aktivadon;
- Junularo malaktiviĝis pro ekonomiaj bezonoj, inkl. de pli ol unu laborposteno;
- Interreto hejme estas malofta, sed poŝtelefona 4G-servo estas disponebla;
- Guglo-formularoj ne taŭgas por Kubo; oni uzos rektan komunikadon.

Junularo kaj TEJO

Membroj sub 36 jaroj en la 1-a de januaro 2025/2026 estos ankaŭ membroj de TEJO.

Gravas paralele kompreni la staton de Kuba Esperantista Junulara Organizo (KEJO) kaj la junulara agado en Kubo.

APENDICO

Agadplano

Ĉefa celo: sukcese lanĉi la Programon 101: Kubo kaj establi solidan kunlaborbazon por atingi 101 membrojn antaŭ la fino de 2025.

Konkretaj Rezultoj (KR) + Kernaj Progres-Indikiloj (KPI):

- KR1: Kompletigi la preparfazon kun ĉiuj laborelementoj difinitaj por lanĉo | KPI1: Nombro da tagoj inter lanĉo limdato | Celo: lanĉo antaŭ 15.10.2025
- KR2: Reaktivigi kaj ĝisdatigi la datumbazon rilate al kubaj esperantistoj | KPI2: Nombro de registroj reviziitaj, % de retpoŝtadresoj validigitaj, nombro de novaj kontaktoj aldonitaj | Celo: 354 kontaktoj reviziitaj, 101 retpoŝtadresoj validaj, +50 novaj kontaktoj
- KR3: Akiri kritan kvanton da novaj/reaktivigitaj membroj kun strategia kvalito | KPI3: Aĝa distribuo, % de membroj, kiuj informis pri profesio, % de membroj, kiuj pretas fariĝi delegito | Celo: ekvilibra aĝa distribuo aŭ pli junularema (almenaŭ 30% sub 36 jaroj), 30% ligitaj al edukado, 1 delegito por reprezentita urbo
- KR4: Establi efikan kunlaborkanalon kun KEA | KPI4: Nombro de kunordigaj sesioj, reprezenteco de la aktivularo, nombro de plenigita retrokuplo | Celo: minimume 4 kunordigaj sesioj, aktiva kontakto kun aktivuloj en la sidejo kaj minimume 3 filioj, 80% kontentaj pro kunlaboro tra retrokupa formularo

Agado laŭ temposkemo:

FAZO 1: PREPARADO KAJ LANĈO (1-a ĝis 15-a de oktobro 2025)

- Kunordigi lanĉon kun KEA | Estrarano respondeca pri Ameriko + KEA
- Pretigi mesaĝon sendendan al kubaj esperantistoj | Estrarano respondeca pri Ameriko + KEA
- Validigi retpoŝtadresojn en la datumbazo | Ofichavanto de UEA rajtigita aliri la datumbazon
- Fari 1-an kunordigan sesion kun KEA por lanĉo | Estrarano respondeca pri Ameriko + KEA
- Informi la Komitaton, la publikon kaj alvoki al subteno (plenuma kaj financa/donacoj)

FAZO 2: FUNKCIIGO (16-a de oktobro ĝis 15-a de novembro 2025)

- Retpoŝta kontaktado kun historiaj membroj por ĉiuj funkciantaj retpoŝtadresoj | Ofichavanto de UEA rajtigita aliri la datumbazon
- Disvastigo de la remembriĝa eblo tra KEA-retoj (sidejo, filioj, KEA-kontaktoj): 15+ lokaj disvastigoj (Kubo havas 15 provincojn) | KEA
- Funkciigi alternativajn aliĝmetodojn (rekte retpoŝte, pere de spezfolioj) por loka realeco: minimume 2 alternativaj metodoj | UEA + KEA
- Kolekti la aliĝojn, mastrumi la rimedojn kaj ensistemigi la informojn | Estrarano respondeca pri Ameriko + CO

APENDICO

FAZO 3: INTENSIGO KAJ SEKVO (16-a ĝis 30-a de novembro 2025)

- Personaj kontaktoj al plej aktivaj historiaj membroj por fortigi la rilatojn kaj formaligi delegitojn | Estrarano respondeca pri Ameriko + KEA
- Dua kontakto al nerespondintoj | Ofichavanto de UEA rajtigita aliri la datumbazon
- Kritika analizo de la rezultoj laŭ la KPI-oj | UEA + KEA
- Fina fokusa kampanjo por la junularo | KEA + KEJO
- Procedi al ĉiuj aliĝoj: 100% | UEA
- Mezuri la atingojn (KPI + retrokuploj) kaj adapti aŭ evoluigi la strategion (vidu "Riskoj"): konkluda raporto | Prezidanto de UEA + kunlaborantoj

ĜENERALAJ MEZURTIPOJ:

Kvantaj:

- IM-kvanto | Nuntempe: 24 (2025) | Progreso: % (notita kresko)
- Taga aliĝrapido: se 101 en du monatoj, po 1-3 membroj/tago post lanĉo
 - Kosto: 0 EUR por membro (subvenciita), ŝablone po 2 EUR/membro por UEA (aranĝebla kadre de Fondaĵo Ameriko, VK aŭ donacoj rekte al KEA, se tra spezfolioj)
 - Komunikada efikeco: kvanto da kontaktoj vs. kvanto da (ne)respondoj

Kvalitaj:

- Kontenteco: $\geq 8/10$ (partneroj el KEA)
- Reaktiviga sukceso: % de membroj por kiuj eblis doni delegitecon aŭ alian komisiitecon
- Kunlabora efikeco: 100% de kunordigaj sesioj laŭplane

Procezaj:

- Respekto al la temposkemo: (mal)fruoj laŭ planitaj datoj
- Datumbaza kompleteco: 100% de kontaktaj ĝustaj informoj
- Traktado de ĉiuj aliĝoj registre kaj finance: 100%

ANTAŬVIDITAJ RISKOJ:

Risko | Probablo | Frapo | Kuraco

- Malalta respondado de eksmembroj | Alta | Alta | Diversigi kontaktmetodojn, personigi mesaĝojn, kunlabori kun delegitoj
- Neŝablonaj reagoj pro neuzo de formulara sistemo | Alta | Meza | Fokusi pri la kernaj informoj kaj provi alian sistemon
- Neatingo de celo de 101 membroj | Malalta | Alta | Fokusi je kvalito de la membraro (veraj aktivuloj); establi solidan celon por 2026
- Kulturaj malsamecoj rilate la atendojn pri membreco kaj engaĝiĝo | Malalta | Alta | Fokusi je klara konsciigo kaj konverĝa informado, respektante la lokan kulturon; konsideri seminarion pri interkultura kompetento

APENDICO

SUKCESATINGO

- Akiro de minimume 101 IM-oj el Kubo por 2025/2026;
- Datumbazo ĝisdatigita
- Formala nomumo de Komitatano A de UEA el Kubo post ol atingi la celon de 100 membroj
- Plifortigo de la ligo inter UEA, KEA kaj la loka membraro per stablo de fluaj komunikrimedoj
- Kreo de daŭrigebla modelo por aliaj landoj

Modelo de mesaĝo al iama(j) membro(j)

Preparita kunlabore kun kaj aprobita de KEA.

Konkludo

STRATEGIAJ ASPEKTOJ:

- Forta historia signifo de la Esperanto-movado en Kubo;
- Ekzistas fizikaj oficejoj de KEA kaj filioj, kiujn UEA povas ĉies-gajne utiligi;
- Komunigita datumbazo inter UEA kaj KEA pri Kubo;
- Planata vizito de la Prezidanto de UEA en februaro 2026 por subteni la lokan movadon.

EKSTERAJ MINACAJ:

- Ekonomiaj aspektoj en la lando;
- Tempomanko ĉe la junularo;
- Malalta interreta konekteco dehejme.

AKIRI – Strategia Plano de Universala Esperanto-Asocio (2025-2030)

© Universala Esperanto-Asocio, 2025

Sen ISBN.

1-a versio: 2025-10-08

2-a versio, lingve reviziita de Rob Moerbeek: 2025-10-10.



Universala Esperanto-Asocio